



# BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha  
Věstník Klubu esperantistů v Praze  
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 1/2000

Marto/březen 2000

Post longa kaj nevenkebla malsano forpasis nia samideanino

Stanislava Ghrdlová.

Ŝi mortis nur 45jara la 28an de januaro 2000. Ŝia forpaso estas granda malfeliĉo ne nur por ŝia familio, sed ankaŭ por nia klubo kaj por nia tuta movado.

Ĉiam tre bonhumora kaj diligenta, ŝi estis la ĉefdelegito de UEA en nia lando, kunorganizanto de la pasintjaraj SAT-kongreso kaj ILEI-konferenco kaj de multaj aliaj aranĝoj en la pasintaj jaroj. Multfoje ŝi prelegis en nia klubo pri la aktivecoj de UEA kaj pri sia esperantista agado.

Ŝi kunautoris la ĵurnalan kurson de Esperanto, kiu aperis ĉiutage en la tiama ĵurnalo *Expres*. Krome ŝi kunverkis la popularan lernolibron *Esperantem za tři měsíce, Konversacian libreton kaj aliajn*.

La adiaŭa ceremonio okazis la 11an de februaro en la preĝejo de S-ta Nikolao en la Malnovurba placo en Prago, en ĉeesto de multaj geesperantistoj pragaj, enlandaj kaj ankaŭ eksterlandaj.

Nian profundan kondolencon al ŝia edzo Petr Chrdle, al ŝiaj gefiloj kaj al ceteraj familianoj.

## Pozvánka

na výroční členskou schůzi Klubu es-perantistů  
v Praze

Zveme všechny členy Klubu esperantistů v Praze na naši výroční členskou schůzi, která se bude konat v pátek

24. března 2000

od 16.00 do 19.00 hod. v naší schůzové místnosti v Rybné ul. č. 25-27 ve Starém Městě.

Program schůze:

1. Zpráva o činnosti klubu za období 1999/2000
2. Zpráva hospodáře
3. Diskuse
4. Volba výboru
6. Usnesení schůze

Upozorňujeme, že schůze našeho klubu se konají pravidelně každý pátek mezi 13.00 a 19.00 hod. Všichni jsou vítáni v tomto časovém rozmezí; přijďte, kdy se Vám to hodí. Zvláště srdečně zveme členy, kteří mohou náš program obohatit svými příspěvky; přitom není nutné hlásit se předem.

Např. 18.1. nás navštívil pan Vládo Sládeček z Ostravy a promítal diapozitivy z různých esp. setkání s bezvadným esp. komentářem, podmalovaným hudbou.

Před koncem roku měla v našem klubu velice zajímavý a hodnotný pořad o své esperantské poezii paní Eli Urbanová a přislíbila další návštěvu.

### Supo por malriĉaj infanoj

Princo Roberto estis tre humana homo. Iun tagon li ekdecidis fondi en la vilaĝo, en kiu li havis kastelon, sup-institucion por malriĉa lerneja junularo, sekve li konstruigis per granda kosto pavilonon kaj el Vieno li mendis transporteban militkuirejon. Kiam la kuirejo alvenis, la princino surgenue petis lin, ke li rezignu pri sia intenco. Sed la princo diris: "Ne, princino, mi mem kuiras terpoman supon por tiu aĉularo." Poste petis lin ankaŭ la frato de l' princino, grafo Manhard, ke li lasu tion, ĉar tio estas maldigna por princo.

Sed princo Roberto ekkriis, ke li kuiras la terpoman supon mem kaj ke li estas kompleza kiki ĉiun, kiu volus lin deturni de tio. Princo Roberto estis tre humana sed ankaŭ tre incitigema homo.

Tiel okazis, ke iun tagon oni florkronis la pavilonon kaj la transporteban militkuirejon per freŝa pinglobranĉaro, super la pavilono levis surskribon: „Dank' al Dio", en la branĉaron enplektis standardetojn kaj dukolorajn rubandetojn kaj la ĉefa ĉambristo staris ĉe la forno kaj hejtis vestita en frako, kun cilindra ĉapelo sur la kapo. Tiel deziris tion princo Roberto.

Li mem do senpacience rigardis tra fenestro, ĝis la ĉefa ĉambristo demetos la cilindran ĉapelon de sur la kapo kiel signo de tio, ke la akvo jam bolas kaj ke estas tempo, por ke Lia Ekscelenco senŝeligu terpomojn. Tio nome estis la programo de la princo.

Fine las princa moŝto eliris el la kawstelo kaj paŝis serioze kaj digne al la pavilono, antaŭ kiu staris la militkuirejo.

Tie vilaĝestro estis tre okupita per tio, ke li pugne fosis sub la ripoj de kelkaj malriĉaj infanoj, kiuj neglektante Lian Ekscelencon havis ankaŭ en tiu ĉi momento la fingrojn en la nazo.

Sed la vilaĝestro sciis kio decas. Li ordonis al ĉiuj 23 malriĉaj lernantoj en la vilaĝo, ke ili voku "Vivu!" al la princa moŝto, ĵetis supraĵan rigardon, ĉu ili estas lavitaj kaj signis al policano Pazourek, kiu bruligis brulŝnuron ĉe la unua bombkanono kaj rapide saltis al la alia. Du pafbruoj ektondris kaj la princa moŝto eliris al la fumo, kiu ŝvebis super la bombkanono. La

infanoj kriegis surdige. La princa moŝto afable mansvingis kaj eksidis antaŭ la militkuirejo. Du lakeoj donis al li terpomon. En blankaj gantetoj la princa moŝto senŝeligis ĝin, ĵetis en kaldronon kun bolanta akvo. La infanoj ne plu povis kriegi pro ĝojo, ĉar ili raŭkiĝis kaj Lia Ekscelenco komencis senŝeligi alian terpomon. Denove li ĵetis ĝin en la kaldronon; nova ĝojkrio aŭdiĝis. Princo Roberto leviĝis kaj ekparolis: "Vi infanetoj ĝoji, manĝi supo kaj esti ĝojaj, ke mi vin kuiru. Vi infanetoj rememoris al vi, ke via princino, mi esti via patrino, ke vin..." Denove aŭdiĝis ĝojkriego kiel signo de tio, ke faras al ili grandan plezuron, kiam Lia Ekscelenco tiel bele esprimas sin.

"Vi infanetoj, mi esti hodiaŭ la plej bona monumento via ke mi kuiru," daŭrigis la princa moŝto digne. "Vi fari ham ham el la bona supo, kiun mi terpomigis. Preĝi por Dio ĉe mi!"

Persona ĉasgardisto alkondukis jam ĉevalon al la princo, Lia Ekscelenco fortrotis al arbaro, kaj lakeoj kaj la ĉambristo foriris fiere en la kastelon.

La vilaĝestro ŝovis gantojn en poŝon kaj rigardis la 23 malriĉajn infanojn, poste la komunuman policanon Pazourek, poste li rigardis en la gantojn, ĉu tamen eble tie io estas, post kio li turnis sin al la komunuma konsiliano Veřina per vortoj:

"Jes, sed kiu nun finkuiras la supon por la kanajlaro?"

"Pazourek kaj la infanoj finsenŝeligos la terpomojn," diris la komunuma konsiliano Veřina.

"Pazourek, mi ordonas al vi kuiru do la supon, kaj vi, knabinoj, finu la senŝeligadon de la terpomoj!"

Li foriris kun la konunuma unua kaj dua konsilianoj kaj lasis la policanon kun la infanoj sola.

Estis nepriskribeble varmege, kaj la policano Pazourek severe rulis la okulojn kaj insultis la infanojn.

"Mi ne regalus vin per supo! Lia Ekscelenco ankoraŭ faros frandenulojn el vi!"

Li kunmetis la supon el provizoj sur la tablo kun solideco de maljuna soldato, fumante pipon. Nun jam la knabinoj senŝeligis ĉiujn terpomojn,

kaj Pazourek turnis sin ĉe la kaldrono, viŝante per maniko la abundan ŝviton de sur la frunto. Subite li haltis en la kirlado kaj kiel fulmo traflugis lian kapon ideo. Li ekrigardis la knabojn, kiuj petolis sur gazono antaŭ la pavilono, kaj ekkriis en la grupon: "Malina, venu ĉi tien!"

Nenion malbonan supozante stariĝis Malina antaŭ Pazourek. "Ci bubo damnita!" ekkriis Pazourek al li, "hieraŭ mi vidis vin sur la komunuma kampo pluki guŝojn. La monpuno estas unu ormonero. Donu al mi unu kronon kaj alvoku la fraton Joĉjon. Joĉjo, bubo damnita, ĉu vi scias, ke vian fraton Karlon mi arestos, hieraŭ li plukis guŝojn. La monpuno estas unu ormonero. Unu kronon li ricevis de la princa moŝto, vi ankaŭ havas unu kronon, kaj danku al Dio, ke ni havas tian bonan princon. Kiu anstataŭ vi, fiknaboj, pagus la monpunon? Tiu ĉi krono de Karlo kaj jen tiu ĉi krono de vi, Jocjo, estas ĝuste la ormonero. Sed kiam mi ankoraŭfoje vidis vin pluki guŝojn, tiam mi fermos vin en stalon ĉe la oficejo, kaj vi malsuprenigos la pantalonon kaj kanvergo havos festenon. - Ŝteli estas, infanoj, granda peko. Mi pardonas al vi, kaj vi, Joĉjo, kuros por duonbotelo da sekalbrando, kaj Karlo kirlos la supon."

Pazourek kontente sidigis sin sur la herbon. Poste Joĉjo alportis duonbotelon da sekalbrando, Pazourek rimarkinde satrinkis, alvokis ĉirkaŭ sin la infanojn kaj parolis al ili longe, kiel ili devas estimi sian nobelaron. "Tiu ĉi nobelaro estas de la Dio mem, fiuloj!"

Kaj sendis por ankoraŭ unu duonbotelo da sekalbrando.

La suno estis alte sur la firmamento, kaj Pazourek demetis siajn botojn. Poste kuŝiĝinta sur la herbo oportune li ekdormis ĉe la kaldrono, dum la atendantoj de la princa terpoma supo komencis ludi je "rabistoj".

Sed la bruo ne vekis Pazourek; cetere la rumoro malproksimiĝis, ĉar la "rabistoj" moviĝis al arbaro.

Estis tagmeze, kiam la princa moŝto estis revenanta el la promenrajdo hejmen en la kastelon.

Lia unua rigardo falis sur la forlasitan militistan kuirejon kaj malplenan pavilonon.

El la kaldrono leviĝis vaporo, estis aŭdebla la sono de bolado, kaj el la kaldrono elstaris kaj saltetis botoj de la komunuma policano Pazourek, kiun la princa moŝto per kiko vekis, ĉar li ja estis humana, sed ankaŭ tre incitiĝema.

Kaj el profunda veturvojo super la deklivo, kaŝitaj de prunela arbedaro, kun plezurego en la koro la fratinoj Malina rigardis la botojn en la kaldrono kaj la tutan scenon, samkiel artisto rigardas sian verkon, kiu estis honorita per la unua premio.

Tiu rigardo kompensis al ili la perdon de du kronoj.

La princa moŝto senprokraste likvidis la sup-institucion, kaj kiam lia bofrato, grafo Manhard, tre bonkora sinjoro, renkontis foje en arbaro la komunuman policanon Pazourek, demandis lin kun intereso, kiel ili kuiris la unuan kaj lastan terpoman supon.

"Grafa Moŝto," diris sincere Pazourek, "estis terure. Se estus tie vi, tiam vi certe mortaĉus...!"

(Tradukis Jiří Patera)

### Granda sukceso de la Esperanta vortaro

En la konkurso „Vortaro de la jaro 1999”, kiun aranĝis la Unuiĝo de interpretistoj kaj tradukistoj (Jednota tlumočníků a překladatelů) inter 84 diversaj vortaroj la tre belam 8-9an lokon okupis la Ĉeĥa-esperanta vortaro de Karel Kraft, kune kun Rusko-slovenský frazeologický slovník.

La Ĉeĥan-esperantan vortaron de Karel Kraft eldonis KAVA-PECH Dobřichovice, la eldonejo de D-ro Petr Chrdle.

### **B U L T E N O nepravidelný věstník**

**Vydává Klub esperantistů v Praze pošt. schr. 1069, 111 21 Praha 1**

**Podávání novinových zásilek povolila Česká pošta, s. p., Odštěpný závod Praha čj. nov 6127/96 ze dne 23. 10. 1996**

**Placeno v hotovosti Novinová zásilka**